MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 2

FEBRUARO 2020 Kol. 418/36

xxxx

interesaj diskutrondoj. En diversaj prelegoj oni pritraktis la klimaton, mediprotektadon, ekologion, kio fakte estis la kadra temo. Okazis diversaj Esperanto-kursoj kaj lingvajdiskutoj aŭ prelegoj. Allogis la esperantistojn la prelegoj "Kiel prezenti Esperanton al pli ol cent infanoj", "Kiel iĝi poligloto: teknikoj pri lingvaj interŝanĝoj", pri "Sens-ama plezuro de la prononco", "Malĝustaj asertoj pri Esperanto", "Rilatoj inter lingvoj kaj matematiko".

Estis prezentata la Esperanto-kulturo tra 50 jaroj de Literatura Foiro. Ni ankaŭ eksciis, kial la francaj poldevenuloj jubileas, kiel Eŭklido inventis matematikon kaj cetere pri matematikaj misteroj. Oni parolis pri la vivkvalito, pri sana manĝado, pri kolesterolo, pri bicikloj kaj arto. Eblis sperti ĵongladon, sorobanon, rubikkubon, ĉigongon, malstreĉan gimnastikon aŭ ĉeesti Sukuro-kurson de unua helpo.

Ĉiutage okazis diskutoj pri diversaj aktualaj temoj: "La nova silka vojo", "Virinaj rajtoj", "Rusia ekspansiemo", "Financado en politiko", "Klimataj ŝanĝoj - ĉu koŝmaro aŭ oportuno?", "Katalunio/Hispanio, Skotlando/Britio, du modeloj de sendependiĝo". Krome interesis la prelegoj "La Luno: 50 jarojn post la unua paŝo sur ĝi", "La egipta vojaĝo al la transa mondo", "20 jaroj de Reta Vortaro","Leonardo kaj Rafaelo: kiu superis kiun?", "Kulturaj diferencoj inter Eŭropo kaj Azio".

Iuj interesiĝis pri la dutaga seminario "Ĉu vi volas pravi aŭ feliĉi?" bazita sur la procezo SenPerforta Komunikado (SPK). Kolektiĝis ankaŭ amikoj de EsperantoLand. Estis prezentata la

venonta UK en Montrealo kun diversaj planitaj ekskursoj. Bicikla vojaĝo portis nin de Tromsø al Porto.
Okazis tablo-tenisaj turniroj, verkado de poezio, kantado, muzikado, israelaj dancoj, zumba, biergustumado, vortludoj kaj kvizoj. Ne mankis manlaboroj, fabrikado de ornamaĵoj, trikado de polpetoj kaj aliaj aĵoj… En la halo estis instalita kesto por libroj alportitaj de partoprenantoj, kiujn oni povis libervole preni aŭ interŝanĝi.
Estis prezentataj diversaj filmoj, pupteatraĵo pri "Aleksandro kaj la mekanika muso", japana teatro Kamiŝibajo, fotoj el la pasinta NoRo, Novjara koncerto de diversaj artistoj. Vesperan koncerton prezentis "Inicialoj DC".

La libroservo proponis multajn librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Je dispono estis diversaj tabloludoj kaj puzloj. El ruboj kolektitaj ekstere la infanoj faris diversajn artaĵojn. Krome ili spertiĝis pri origamio, feltumis, faris bildojn el diversaj semoj, plektis braceletojn kaj ŝatis frandi ĉokoladajn bananojn.
Post la Silvestra bufedo ni bonvenigadis diversajn Novjarojn kaj dancis ĝis frue en la mateno. Estis prezentataj kantoj por la Festivalo de la Paco, organizata de Unesko, kiu okazos la 19-an de septembro 2020 en Tolosa (Hispanio). La tekstoj devas esti tradukitaj al unu el la kvar laborlingvoj, inter kiuj estas ankaŭ Esperanto.
Dum la Internacia vespero ni spektis ĵongladon, ĝuis kantadon, dancadon, akrobataĵojn kaj aliajn kontribuaĵojn, prezentatajn de niaj ĉiuaĝaj talentuloj. Post la vesperaj programeroj interbabilado daŭris en gufujo. Ĉe la fino de la aranĝo

sursceniĝis ĉiuj kontribuintoj de la diversajn programerojn, kiujn oni dankis per forta aplaŭdo. Dum la tuta semajno regis agrabla Esperanto-etoso.

La 18-a NoRo estis sukcesa, ĉiuj entuziasme kunlaboris kaj promesis veni jarfine denove en la saman lokon por komune amuziĝi kaj ĝui la semajnon. Liba Gabalda

Ĉeĥaj fervojoj forigas barierojn

La nacia trafikisto Ĉeĥaj Fervojoj (*ČD*) proponas en trajnhoraro 2020 entute 4845 senbarierajn trajnkunligojn. Temas pri la plej vasta reto de senbarieraj trajnoj tra la tuta Ĉeĥa respubliko. En la venontaj du jaroj *ČD* enkondukos en trafikon dekojn da pliaj trajnoj kaj proponon de veturado por pasaĝeroj kun handikapo, plimul-tigos por pliaj fervoj-linioj.

La preparatajn novaĵojn Ĉeĥaj fervojoj anoncis okaze de la foiro *Rehaprotex* sur la foirejo en la urbo *Brno*, al kiu estis el Prago trajnekspedita speciala senbariera trajno por la Ministerio de tra-fiko *ČR* kaj la Nacia konsilio de personoj kun handikapo. Al forigado de barieroj en la veturilparko de Ĉeĥaj Fervojoj sin dediĉas longatempe. Ekzemple antaŭ dek jaroj *ČD* havis ĉirkaŭ 350 senbarierajn veturilojn kaj trajnekspedis 1500 senbarilajn trajnojn, en la nova horaro 2020 disponos pri pli ol 600 senbarieraj pasaĝervagonoj kaj trajnunuoj kaj proponos 4845 senbarierajn kunligojn en ĉiu tago.

En la jaro 2014 *ČD* enkondukis ankaŭ specialan mendan sistemon, per kies helpo personoj kun handikapo eblas antaŭe mendi transporton kaj asiston de la dungitoj ĉe entrajnigo kaj eltrajnigo al/el la trajno. Depost ĝia komenco la nacia trafikisto helpis en vojaĝado al jam pli ol 35 mil pasaĝeroj kun handikapo. Pliaj dekmiloj vojaĝis danke al enkondukado de basplankaj veturiloj sen asisto de la dungitoj de Ĉeĥaj Fervojoj.
En la plej proksimaj jaroj estos enkondukataj en trafikon novaj trajnunuoj *RegioPanter* de la kompanio *Škoda Transportation* kaj ankaŭ novaj rapidtrajnaj trajnunuoj de la konsorcio *Siemens-Škoda.* Samtempe okazos publikaj konkursoj por produkto de 60 novaj elektraj kaj 60 motoraj basplankaj trajnoj por regiona trafiko kaj 20 trajnkompletoj por longdistancaj eksprestrajnoj. Tiele modernigita veturilparko proponos al homoj kun limigita kapablo de moviĝo multe pli bonajn eblojn en veturado kaj tre komfortajn kondiĉojn.
(Laŭ *ČD por vi* 12/2019) J.Tomíšek

Dudeka datreveno de la E-klubo en Mladá Boleslav

En januaro de la jaro 2000 fondiĝis „Rondeto de Doktoro Hradil“. La ideo aperis post la kongreso de ĈEA en Tábor. La iniciantinto Míra Vaněk proponis doni realan formon al la agado sur la kampo de Esperantujo al kvar entuziasmaj personoj – anoj de Asocio de Handikapitaj Esperantistoj:

MUDr. Josef Hradil, posedanto de la pensiono „Espero“ en Skokovy, kunfondinto de tiu ĉi asocio kun Josefo Vaněček – lia lernanto, la gastiganto de famaj lingvaj seminarioj aranĝitaj du-foje jare: printempe kaj aŭtune, elstara esperantisto, eldonanto

de la gazetfolio „Verda familio“, kreinto de medicina vortaro kaj honora ano de UEA kaj ĈEA kaj Jagellona universitato.

Jindřiška Drahotová – hospitala flegistino, instruantino de du aliaj anoj de la Rondeto kaj pluraj lernantoj en lernejoj kaj gimnazioj en la urbo Mladá Boleslav. Tradukanto de originalaj Esperantaj verkoj kaj eldonantino de „Legolibretoj“. **Miroslav Vaněk** – junulo, aktiva krea ano de la komitato. **Miroslava Ascherová** – junulino, uzanto de Esperanto, pasia vojaĝanto, fervojisto.

Tiuj kvar homoj allogis aliajn homojn al diversaj aranĝoj en Esperantujo por neformala aktiva partopreno. Post la morto de d-ro Hradil en la jaro 2008, aktive laboris Eva Pánková, Milada Kolářová, Pavel Brom, Eva Novotná, Blanka Hužerová kaj pluraj aliaj. En Skokovaj seminarioj kreiĝis kolektivo de fidelaj amikoj de la lingvo el diversaj lokoj de la respubliko kaj ankaŭ el eksterlando.

Nun post dudek jaroj okazos la 50-a seminario en marto 2020, unuafoje en alia loko.Dum la tempopaso la infanoj el bazaj lernejoj kaj lernantoj de gimnazioj maturiĝis, foriris studi, aŭ realigi la planojn de sia vivo, la rondeto plu evoluis, maljuniĝis, trankviliĝis. Nun, la rondeto - parto de ĈEA kaj ankaŭ de AEH, funkcias kiel regula, neformala „Klubo Klementinka“, en la bela bone ekipita „Komunitní centrum“, fondita de la urbo Mladá Boleslav. La homoj, kiuj frekventas la kunvenojn, estas kursanoj

el la jaro 2017 en la urba biblioteko, kiuj aliĝis laŭ simpla afiŝo en la biblioteko. Kaj venas ankaŭ tiel nomataj „amikoj de Esperanto“ por partopreni prelegojn pri esperantaj aferoj. Venu ankaŭ vi. J. Drahotová

Vizitu la ursan parkon en Beroun!

La simbolon de urso la ĉeĥa urbo Beroun, kongresloko de la 73-a IFEF- kongreso havas en sia emblemo kaj ankaŭ sur sia flago. Ekde oktobro 2000 la urbo havigis eĉ ursojn vivajn. **Kuba**, **Vojta** kaj **Matěj** naskiĝis la 13-an de januaro 2000 en la urbo Český Krumlov al la dekkvar-jaraj gepatroj Kateřina kaj Vok. Baldaŭ poste famigis ilin la televida serio de porinfanaj rakontoj fare de Václav Chaloupek ***Méďové (Ursetoj).*** Post la filma rolado ili trovis hejmon sur la Urba monto en Beroun, sur kiu la urbo konstruigis **ursan parkon.** La viluloj ĉi tie havas belan kaj vastan promenejon (preskaŭ 25 arojn) kun akvo-baseno. Troviĝas ĉi tie tri dormejoj kaj preparejo de manĝaĵo. En proksimo estas infanludejo kaj refreŝigejo. Ekde la 13-a de aprilo 2016 en la ursejo vivas nur Matěj kaj Kuba. La plej malgranda Vojta en tiu ĉi tago dum banado en la baseno kolapsis kaj mortis. Okaze de festado de la naskiĝdatreveno tamen la gratulantoj ĉiam dediĉas ankaŭ al Vojta silentan rememoron. Okaze de la 20-a naskiĝdatreveno de la ursoj Matěj, Vojta kaj Kuba la urbo Beroun preparis por ĉiuj iliaj ŝatantoj kaj favorantoj limigitan

eldonon de potetoj kun bildo de ĉiuj tri fratoj, kies aŭtorino estas Magdalena Součková, kaj serion da memorbildkartoj. Sur dek fotografaĵoj vi povas rememori ne nur la malgrandajn ursetojn, sed ankaŭ tion, kiel la tempo pasis en la berouna ursoparko. Rememorigaj donac-objektoj estas aĉeteblaj ekde la 13-a de januaro 2020 en la Urba informcentro sur Hus-urboplaco de Beroun. Jindřich Tomíšek

Estimataj geamikoj!

Do, la 13-an de decembro mi ĝisvivis 90 jarojn...
Ĉar mi ricevis tro multe da gratuloj kaj mi ne kapablas respondi unuope al ĉiuj, akceptu miajn dankojn en ĉi tiu Informilo.
Sincere mi dankas al vi ĉiuj kaj kore salutas vin.

Jarmila Rýznarová

Trista informo:



La 31-an de januaro 2020 mortis **Inĝ. Jiří Vencl** (83j.), nia longjara ano kaj fervojisto el Česká Třebová. Honoron al lia memoro! red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová, Lenka Angelová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21, 530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.